

ESPERANTO

sub la suda kruco

marto 2019





ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

**OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA
ESPERANTO-ASOCIOJ**

Volumo 26[1] numero 134 marto 2019

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio

Redaktistoj: Terry Manley, Joanne Johns

Provlegantoj: Vera Payne, Donald Rogers

Kontaktadreso: esk2@esperanto.org.au

AEA - ESK

GPO Box 2122

Melbourne, Victoria 3001

Australia

Abonoj & Pasintaj Numeroj

Esperanto sub la Suda Kruco estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA: www.esperanto.org.au / info@esperanto.org.au

NZEa: www.esperanto.org.nz / exec@esperanto.org.nz

Kiel kontribui al ESK

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, esk2@esperanto.org.au

Limdato por kontribuoj por la sekva numero

15-an de majo 2019

La redaktoroj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne necese spegulas la opiniojn aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright © 2019 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj
ISSN 1038-9380.

SUR LA KOVRILO: Esther Parris dum la kongreso en Adelajdo (la gajninta foto de la fotokonkurso, fotita de Joanne Johns)

ENHAVO

Kongreso de Davidoj	04
Saluton!	05
Instrui la komencantojn	06
Mia vojaĝo en Aŭstralio	06
Somerlernejaj Esperanto-kapkovraĵoj	13
Joanne kaj la melburnanoj	14
Kiel vi fartas - 3zzz?	15
Fotoj de la kongreso en Adelajdo	16
Kombuĉo	20
Kostariko	22
Roger Springer	25
Benzinmanka lando	27
Esperanto: Universala help-lingvo	28

Jen refoje diverstemaj artikoloj de kontribuantoj por vi. Iuj artikoloj estas de instruistoj, studintoj kaj partoprenintoj de la AEA-a somerkursaro en Adelajdo kaj al NZEA-a kongreso en Velingtono en Januaro. Dankon al ili kun speciala mencio al Paul Garwood el Aŭklando ĉar estis lia unua verketo en Esperanto.

Kvankam negranda, la AEA-a kursaro estis sukcesa. Iom pli ol 40 partoprenis ĉifoje kaj la reagoj estis ĝenerale pozitivaj.

En 2020 okazos kuna kongreso en Aŭklando kaj nun AEA kaj NZEA komencas plani tion. Do rimarku tion por viaj planoj venontjanuaraj.

Roger Springer jam eldonis la 413an (ja pli kiam vi legas ĉi tion) numeron de Aŭstraliaj Esperantistoj. AEA gratulis lin je la fino de 2018 pro la 400a kaj mi

certas ke ĉiuj el ni aprecas la aktualan informon en ĝi.

Interese David Ryan skribis pri la manko de benzino en Meksiko pro fermado de la duktoj por transporti ĝin. Ĉu estontece ni liberiĝos de tiu energifonto por aŭtomobiloj pro ŝanĝo al elektropovo? Ĉiun jaron estas plibonigoj en tia transporto. Mi ĵus ricevis inviton de la loka universitato por veturi en elektrobuso senŝofora, kiun ili testas nuntempe. Do ĉu finfine la tajdo kontraŭfluas kaj landoj pli kaj pli uzos energifontojn senkarbaĵajn, simple pro ekonomia konsidero?


Ĉu Aŭstralio kaj Novzelando sekvos la vojon de Kostariko, kiu laŭ la artikolo de Indrani en 2018 plejparte (90%) uzis energion de la vento, suno kaj geotermaj fontoj?

Kongreso de Davidoj

**DAVID RYAN
(WELLINGTON)**

16 homoj partoprenis la nacian kongreson de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEA) en Wellington en januaro 2019. El la 16 partoprenintoj, surprize kvar nomiĝis David!

La programo estis plena je prelegoj, lingvaj sesioj, vespermanĝo en restoracio, kaj la jarkunsido de NZEA. Ĝoje, partoprenis ne nur longdaŭraj membroj de NZEA sed ankaŭ novaj vizaĝoj, kun grupeto de junuloj el la nova klubo ĉe la Universitato de Auckland. La etoso estis ege pozitiva kaj oni komencis fari planojn por la venontjara kongreso en Auckland.





Saluton!

**SARAH PALMER
(ADELAJDO)**

Mi estas komencanto pri Esperanto. Kvankam mi sciis pri Esperanto dum la plejmulto de mia vivo per mia onklino kaj onklo, mi nur decidis nun serioze studi la lingvon. Mi alvenis al la Adelajda Kongreso/somerkursaro tre maltrankvila. Mi pensis, ke esperantistoj estas strangaj fremduloj, kiuj parolas misteran lingvon.

Nun mi pensas, ke ili ja estas strangaj homoj, sed mi opinias, ke mi mem estas parto de ili kaj iliaj amikoj! Havi malgrandan kaj intiman klason kun instruisto, kiu bone klarigis la bazajn esperantajn gramatikajn regulojn, helpis min kompreni kaj lerni rapide.

Mi lernis dum la matenaj lecionoj kaj parolante kun la aliaj je tagmezo kaj dum la posttagmezaj ekskursoj, ekzemple al la loka bestoĝardeno. La posttagmeza programo estis tre varia: klaso de desegnado, prezentado pri faldeblaj bicikloj kaj eĉ instrukcioj pri Esperanto-retserĉiloj.

Je la fino de la Kongreso mi povis kompreni kaj paroli kun aliaj malrapide.

Mi aparte ĝuis paroli kaj konatiĝi kun aliaj Esperantistoj kaj akiri guston pri kiom utila Esperanto povas esti tutmonde!



Instrui la komencantojn

Estis defio prepari kurson, ne sciante kiaj lernantoj kaj kiom da ili ĉeestos, ĉar mi ŝatas prepari aktivajn kursojn, en kiuj la lernantoj ofte duope kune lernas. Finfine venis la unuan tagon kvin personoj: familio de tri, Dan kaj Ashika Ehlers kun la ok- aŭ naŭjara filo, Leif, Sarah Palmer, juna instruistino, kaj Min Lin.

Min Lin malaperis ĝis vendredo. Sed ĵaŭdon aldoniĝis al la grupeto Garry kaj Marumi Smith, kvankam ili ne vere estas komencantoj, sed ili vigligis la klason. Merkredon por la dua sesio restis nur Sarah. Bonŝance Katja Steele eniris la klasĉambron, do ni retenis ŝin kaj kune ludis ludojn, kiuj ebligas paroli Esperanton kaj ne antaŭen iri dum la neĉeesto de tri lernantoj sed tamen praktiki la lingvon. Kutime ĝuste aŭdi la sonojn de Esperanto ne problemas por parolantoj de Eŭropaj lingvoj, sed ne tiel estas por parolantoj de la ĉina aŭ de iu barata lingvo.

Malgraŭ la malfacilaĵoj, danke al interhelpo kaj diskutoj, mi taksas ke la lecionoj glate iris kaj esperas ke la ĉeestantoj ĝuis sian tempon en la klaso. Kompreneble ni ne sukcesis kovri ĉiujn punktojn preparitajn, do ili devas reveni venontjare por ekscii pri la cetero aŭ trovi lokan aŭ retan kurson por daŭrigi antaŭ ol la entuziasmo velkos.

**FRANCISKA TOUBALE
(MELBOURNO)**



Mia vojaĝo en Aŭstralio
SZABOLCS SZILVA (POLLANDO)

La 2an de januaro, 2019 mi ekvojaĝis al Aŭstralio. Mi ekis de Budapeŝto. Mia unua flugo estis per la firmao British Airways al Londono. Estis kutima flugo, tamen kun ne-malmultekosta flugkompanio, do mi sentis min iom pli komforta ol kutime. Ja ĝenerale mi uzas la tre malmultekostan WizzAir por vojaĝi ene de Eŭropo. De Londono mi pluflugis al Hongkongo per la firmao Cathay Pacific. La unuan fojon



mi havis sperton pri longdistanca flugo, kiu ege fascinis min. Estis tiom granda aviadilo, en kiom granda mi neniam estis. Estis pluraj ĉambregoj kaj pluraj klasoj, diversaj tipoj de sidlokoj. Mi havis la plej malaltan klason, sed krom tio, ke la 24-hora flugo lacegigis min, mi sufiĉe ĝuis ĝin. Senpagaj trinkaĵoj kaj manĝaĵoj tuttempe, ekrano kaj filmoj.

Mi alvenis al Adelajdo la 3an vespere. Sándor atendis min en la flughaveno. Malgraŭ tio, ke ni renkontiĝis nur unu fojon antaŭ 3 jaroj en Slovakio dum SES, ni rekonis unu la alian. Mi instruis tiam Helen en mia grupo tie. Helen tre ŝatis mian instrumentodon kaj jam tiam demandis ĉu mi eble emus veni al Aŭstralio eble post 2 jaroj. Mi jesis tiam, kaj ankaŭ 2 jarojn poste. Dankegon al Sándor kaj Helen pro la eblo! Ni eliris el la konstruaĵo, mi ekvidis palmojn kaj varmegan aeron. Estis tute nekredeble por mi, kiu ĵus estis en la neĝa vintra Finnlando 4 monatojn, ke estis somero tie.





Al la flughaveno alvenis per aŭto Rati, kiu ankaŭ dum la kongreso ofte helpis min. Dankon al vi! La unuan nokton mi tranoktis ĉe Heather, amikino de Sándor. La sekvan matenon mi kaj Heather iris kune aĉeti telefonkarton por mi kaj poste ni promenis en la urboparto Glenelg. Ŝi estis ege helpema kaj mi ege dankas ŝian helpon. Poste ŝi lasis min

ĉe la marbordo, ĉar mi ege volis naĝi. Tio estis malgranda eraro, ĉar mi ne havis kremon kaj tiam mi ankoraŭ ne sciis, ke la aŭstralia suno estas tiom forta. Malgraŭ tio, ke mi restis nur malmulton da tempo, mi sunfritiĝis. Poste mi manĝis la „tipan aŭstralian manĝon” „fish and chips” (fiŝon kaj terpomfritojn) kaj glaciaĵon. Tio estis la dua eraro. Dum la sekvaj sep tagoj mi suferis pro tempozonmalsano, malvarmumo, gorĝdoloro kaj sunfritiĝo. Posttagmeze mi iris al la kongresejo kaj vespere post preskaŭ ĉiu vespermanĝo mi dormis kiel bebeto.

Venis la unua tago de la kongreso. En nia kongresa sako estis bendo, el kiu oni povas formi kapobendon, harbendon, hartukon kaj aliajn. Dum la malfermo mi estis petata montri kiel mi ekuzis ĝin. Mi ofte portis ĝin kiel kapobendon. Poste komenciĝis mia unua leciono. En mia grupo, laŭ mi, fakte estis homoj de la komencanta nivelo ĝis la progresanta. Estis ĉiam ĉ. 10 homoj de la aĝo ŝajne 9 ĝis 70. Sekve mi instruis ĉiutage escepte la tagon



de la tuttaga ekskurso. Por instruisto estas tre malfacila tasko bone trovi la taskojn kaj tiel organizi la lecionon por ke ĝi estu interesa por ĉiuj kaze de tia malhomogena grupo. Mi esperas, ke mi sukcesis. La plej granda laŭdo kiun mi ricevis, estis de Eddie, kies pensojn lia patro transdonis al mi: „Eddie diris, ke vi superas ĉiujn liajn instruistojn en Southern Montessori School, Adelajdo. Li neniam diras tiaĵojn. Gratulon!”.

Tio estis kiel mielo por mia koro kaj konfirmo, ke mian kariervojon mi certe bone elektis. Malgraŭ miaj malsanoj, mi pretiĝis ĉiam kiel eble plej bone, kaj provis ke la lernantoj ne havu pro tio malavantaĝojn. Ŝajne mi sukcesis. Tamen tio kaŭzis, ke mi partoprenis malmulte da prelegoj kaj vesperaj programeroj. El tiuj malmultaj, kiujn mi partoprenis, plej plaĉis al mi la prelegoj rilate al Adelajdo kaj Sud-Aŭstralio. Ja tio estis por mi vera novaĵo kaj helpis al mi poste kompreni la realecon dum mia vojaĝo en Aŭstralio. La alia prelego, kiu havis je mi grandan impreson, estis tiu de Ĝo, kiu prezentis kiel ŝi studis sian



familiarbon kaj devenon de sia familio. Tio estis prelego, kian mi neniam vidis antaŭe en Esperantujo, kaj ĝi estis interesa por mi pro tio, ke la lasta stadio de mia Aŭstralio vojaĝo estis la trovado de informoj pri mia parencino, kiu elmigris al Armidale (Aŭstralio) post la dua mondmilito. La 8-a de januaro estis tuttaga ekskurso al la Sovaĝbestparko de Cleland kaj montogrimpado. Mi tre ĝuis tiun ekskurson. Mi vidis multege da bestoj, kiujn mi neniam vidis antaŭe. Kompreneble mi penis kaj eĉ sukcesis fari la devigajn aŭstraliajn fotojn: 1) Mi manĝiganta kanguruon;





2) Mi brakumanta koalon. Mi fakte ankaŭ tuŝis serpenton pri kio ankaŭ fariĝis fotoj. La sekvan posttagmezon okazis oficiala ekskurso al la Adelajda artgalerio. Ĉar mi ne ŝatas artgaleriojn, mi decidis simple viziti la urbon. Je mia bonŝanco pri mia plano eksciis Katja, la edzino de Trevor, kiu tute bone planis por mi la tagon, vizitis kun mi ĉion, direktis min, invitis min al kafejo, rakontis ege multe da interesaj aferoj pri Adelajdo kaj Aŭstralio. Ni iris eĉ al frizisto kaj apoteko por aĉeti por mi kremojn por mia haŭto kaj medikamentojn por mia gorĝo. Kaj ĉion ĉi en mia gepatra lingvo, la hungara. Koran dankon al vi Katja, denove. Dum la kongreso mi eksentis denove Esperantujon, la internan bonon de esperantistoj, kio vibras de malproksime, kaj kio tiom mankas post la fino de E-kongresoj. En Aŭstralio krom tio mi ankaŭ sentis ke la tuta kongreso estis familia. Ĉiu agis kiel parto de granda familio. Tion ĉi, ekde longa tempo, mi ne sentis en E-aranĝoj.

La forirtagon matene venis preni min Katja kaj Trevor per sia aŭto por iri al ekskurso en la ĉirkaŭaĵo de Adelajdo. Ni iris unue al la montaro. Pro tio, ke ni iom perdiĝis pro la amaso de biciklistoj kaj vojfermoj, mi enŝaltis la birilon de mia telefono. La teĥnologio irigis nin per tiaj vojoj (eĉ mallarĝaj tervoj), kiujn eĉ Trevor kaj Katja neniam trapasis. Foje estis tre amuze. Poste ni iris al la urbo Gumeracha, kie ni surgrimpis altan balancĉevalon, estis en bestoĝardeneto, rigardis la diversajn varojn en memoraĵvendejo kaj tagmanĝis. Sekve survoje ree al Adelajdo tamen ni haltis en vinkelo, kie ni gustumis ĉ. ok diversajn tipojn de vinoj. Mi eksciis, ke Aŭstralio estas ege riĉa je vinoj kaj dum tiu ĉi semajno fakte mi havis ŝancon kelkfoje gustumi ilin. Ili tre plaĉis al mi. En la vinkelo hazarde ni renkontis esperantistojn; la mondo malgrandas. Reirinte al Adelajdo ni iris al la botanika ĝardeno, kiu estis ege bona decido. Mi tre ŝatas ĝin. Poste mi iris al botanikaj ĝardenoj ankaŭ en Sidnejo kaj Melburno, sed en tiuj ne estis tiom granda

kaj impona vitrodomo kiel en Adelajdo. Post ĉi tio ili portis min al la flughaveno kaj mi forflugis al Sidnejo. Katja kaj Trevor, mi tre dankas vin pro la ebleco kaj kuna turismumado.

En Sidnejo vespere atendis min jam mia amikino (sed ne kora), Enikő. Ni estas amikoj ekde nia kvinjaraĝo. Ni provis aŭstralian bieron kaj poste ni iris dormi. La sekvan tagon ni faris piediran turismumadon laŭ la marbordoj de Sidnejo komencante ĉe la marbordo Coogee Beach (Kuĝi plaĝo) finante ĉe la plej konata marbordo, ĉe Bondi (Bondaj). Kompreneble ni uzis multe da sunkremo. Je nia surprizo estis ege grandaj ondoj. Kiam oni eniris ĝis piedoj, forlavis onin granda unumetra ondo al la sablo. En Sidnejo ni loĝis per AirBnB kaj ni ne renkontis esperantistojn. Ni vizitis, laŭ ni, la plej gravajn kaj por ni plej interesajn vizitindaĵojn: la Operejon, la havenponton, Sydney Tower Eye (Sidneja Turo), kiu estas la plej alta konstruaĵo de Sidnejo, la parlamentejon, la botanikan ĝardenon kaj la urbocentron. Unu tagon ni organizis ekskurson al Katoomba (Katumba). Ni iris tien per trajnoj. Kompreneble ni vizitis la Blujajn Montojn kaj la Tri Fratinojn. La tago estis tipa, „hararsekigile varmega”. En Katoomba ni iris longege suben sur ŝtuparoj kaj certis ke ni

povos reveturi per arbara, pendanta trajno. Ni jam ne havis eĉ akvon por trinki. Alveninte al la trajnstacio ni konstatis, ke la lasta trajno foriris duonhoron antaŭ nia alveno kaj ni devis reiri piede. Tio estis ĝuste tia terura sperto, kiun oni ridante memoras post kelke da jaroj. Realveninte al la centro de Katoomba, ni eniris vendejon kaj aĉetis po 3 diversajn trinkaĵojn pro la trinkemego.

Nia sekva stadio estis Melburno, kie ni ankaŭ pasigis 5 tagojn. La tagon post la alvenotago matene ni renkontiĝis kun Sándor Monostori. Mi ekkonis lin antaŭ multaj jaroj dum UK en Danio. Li estis ege helpema kaj volis montri al ni kiel eble plej multe. Li rakontis ankaŭ ege multe da intereseĝaj aferoj pri Melburno kaj Aŭstralio. Unue ni iris kun li al la akvario. Mi jam estis en akvario en Hungario kaj Pollando, tamen la aŭstralia estis iom alia. Estis pli multe da marbestoj, kiujn mi antaŭe ne vidis.

Kompreneble krokodiloj kaj pingvenoj ankaŭ ĉeestis. Sándor aldonis ĉiam



ion interesan rilate al tio kion ni vidas. Pro tio nia persona ĉiĉeronata vizito en la akvario estis eĉ pli ĝuebla. Post la vizito tie ni malsatiĝis. Manke de tipaj aŭstraliaj manĝoj, je la propono de Sándor, ni iris al perua restoracio. Sándor amas Sud-Amerikon kaj li estis tie kelkfoje. Tiel li povis bone proponi kaj prezenti la diversajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn. Kun plena ventro ni ekiris al la plej alta konstruaĵo de la suda hemisfero. Ni liftis supren. Se mi bone memoras la lifto informis nin, ke ni veturas po 8 etaĝoj en unu sekundo kaj ke ni alvenos al la 85a etaĝo. Timige kaj impone. Pro io ege imponas min altaj ĉielskrapuloj kaj de ekstere kaj ene. Mi kapablas stari horojn antaŭ la vitra fenestromuro kaj simple pensi pri la sekretoj kaj mirakloj de la mondo kaj la vivo.

Post tio ĉi Sándor adiaŭis nin. Mi ĉi tie volas denove danki Sándor pro ĉio en kio li helpis nin!

De tie ni rapidis hejmen, mi duŝiĝis kaj rerapidegis al la urbocentro kie mi renkontiĝis kun la melburnaj esperantistoj. Mi revidis kelkajn el la kongreso kaj ekkonis novajn homojn. Bedaŭrinde mi malfruis 30 minutojn. Ni renkontiĝis en korea restoracio, kie ĉefe mi paroladis kun Rejnoldo Evans, kiu vivinte en Koreio kaj havante korean edzinon multe povis rakonti al mi pri la kulturo. Mi ege bone fartis kaj denove eksentis la vibrantan amon de esperantistoj. La ununura afero, kiu negative influis min estis, ke post la fino de tiu vespermanĝo mi denove ekhavetis postkongresan sindromon. Ĉi tie mi danku al Heather pro la tuttempa helpo, helpemo kaj organizado de miaj aferoj antaŭ, dum kaj post la kongreso! Elkoran dankon! En Melburno ni ankaŭ provis viziti ĉion alian, kio povus esti

grava. Interalie ni vizitis la botanikan ĝardenon, la urbocentron, kaj la Sanktejon de Memoro. Tuthazarde ni troviĝis en la festivalo Midsumma (Mezsomera), kiu fakte estis vilaĝo de GLAT-personoj. Estis bone vidi, ke ĉiu ĝoje kaj kolore festas homajn rajtojn, kiuj antaŭnelonge ankoraŭ estis punataj en la mondo. Kaj ne nur GLAT-personoj festis. Ĉiuj: junaj, maljunaj, plenkreskuloj, infanoj, vere ĉiuj! Bedaŭrinde en la loko kie mi loĝas, tio estas neimagebla. Malamo al tiaj personoj estas granda. La tagon antaŭ nia foriro ni sukcesis renkontiĝi ankaŭ kun Franciska. Ni vojaĝis per trajno al Lilydale, kie ŝi prenis nin per sia aŭto. Ni ekkonis ankaŭ Bernie kaj gastigis en ilia domo. Ili montris la domon kaj sian ĝardenon de tre diversaj kreskaĵoj. La plejmulto estis por ni ĝis tiam nekonata. Post tio ĉi ili organizis por ni malgrandan *aussie barbie*, do aŭstralian kradrostadon. Ili preparis multe da salatoj kaj ni tagmanĝis kune. Denove kun plena ventro ni ekiris al tre interesa parko, kiu nomiĝas la Sanktejo de William Ricketts. De tiu parko ni iris al nacia parko, kie kangurooj libere iradas por ke ankaŭ mia amikino povu sperti la kangurekan etoson. Ni pasigis tie multe da horoj, sed fine ni vidis multe da kangurooj. Franciska reveturigis nin al la stacidomo kaj la sekvan tagon ni forflugis al Armidale. Mi kore dankas vin Franciska pro la bonega tuttaga ekskurso.

Nia sekva stadio estis Armidale, kien fakte mi iris por esplori pri mia parencino, kiu elmigris al tiu ĉi urbo post la dua mondmilito kaj vivis tie ĝis sia morto. Mia vojaĝo tie estis tre sukcesa, sed vi povas legi pri tio en mia aparta posta raporto. En Armidale mi ekkonis Terry, kiu estas tre kara kaj helpema persono. Dankon al vi pro la helpo!

Somerlernejaj Esperanto-kapkovraĵoj

KATJA STEELE (ADELAJDO)

La partoprenantoj de la ĉi-jara somerlernejo ricevis en sia kongresa sako nekutiman donacon: elastan tub-forman ŝtofon 50 centimetrojn longan kun 50 centimetroj en perimetro. Ĝia baza koloro estas malhelverda kaj sur ĝi estas presitaj la E-flago, la simbolo de nia asocio (kanguruo kaj stelo), la vortoj “Esperanto” kaj “lingvo internacia” en diversaj grandecoj. Nur 2-foje aperas la vorto “Headskinz”, la komerca nomo de la aĵo. Vidu, kiel niaj kongresanoj uzis la donacon.



Joanne kaj la melburnanoj

**INTERVJUIS: KATJA STEELE
(ADELAJDO)**



Joanne Johns komencis lerni Esperanton en 2013. Ekde tiam ŝi partoprenis somerkursarojn en 2014, 2015, 2017 kaj 2019 kaj ekaktivis en Melbourne organizante la tieajn Meetup-kunvenojn, dimanĉajn renkontiĝojn de esperantistoj, kaj ludvesperojn. Ĉiulunde ŝi iras al la E-kunvenoj, zorgas pri la retaj informoj, gajnis la TEJO-konkurson pri la emblemo de la IJK (2015), iĝis teknika redaktanto de ESK (2014-nun), iĝis estrarano de AEA (2014-2017) kaj dume ĉiam pli kaj pli flue parolis Esperanton. En 2017 ŝi iĝis la prezidanto de la Melburna Esperanto-Asocio. Intertempe ŝia partnero Peter ankaŭ esperantistiĝis kaj akompanas kaj helpas Joanne en multaj manieroj.

K: Ĉu ne pezas sur vin la tasko esti prezidanto?

J: Mi faris miajn agadojn proprainiciate antaŭe kaj mi daŭrigas la saman agadon kun la "titolo" prezidanto. Aldoniĝis nur unu jarkunveno.

K: Kiuj estas la aliaj membroj de la estraro?

J: La vicprezidanto estas Tristan Mcleay (kiu verŝajne transloĝiĝos al alia lando), kasisto Heather Heldzingen, sekretario Esther Parris, bibliotekisto Peter Johns.

K: Vi havas eĉ du klubajn kunvenojn semajne!

J: Lunde en Ross House kutime renkontiĝadas la fluparolantoj kaj tien ni direktas ankaŭ la eksterajn vizitantojn. Ni teumas, tradukas librojn en Esperanton kaj libere interbabilas. Ĝis eble antaŭ unu jaro ni havis tie sufiĉe multajn homojn, sed intertempe kelkaj el la fideluloj transloĝiĝis. La dimanĉa renkontiĝo en kafejo ACMI en Federation-placo, kiu lastatempe pligrandiĝas, estas reklamata precipe por komencantoj, sed de tempo al tempo venas al ĝi ankaŭ kelkaj fluparolantoj. Mi neniam scias, kiom da homoj aperos. Diversaj ludoj kaj iom da instrumaterialo ĉiam estas ĉemane kaj mi uzas ilin laŭnecese.

K: Kiamaniere vi trovas tempon por tiom da esperantumado?

J: Ĝis 2017 mi havis nur parttempan laboron, do restis spaco por multaj aliaj aferoj. Sed tiam la patrino de Petro grave malsaniĝis kaj ni ofte flugis al Brisbano por esti kun ŝi. Por replenigi mian monujon mi devis trovi plentempan laboron, sed tio forprenis multe de mia antaŭe libera tempo. Por havi pli da tempo mi rezignis pri la AEA-estraraneco kaj ĉesis fari apartajn ludvesperojn.

K: Kiujn aranĝojn de la melburna grupo vi elstarigus?

J: La plej populara estas la Zamenhof-festo organizata kutime de Heather Heldzingen. Ni kunportas al ĝi manĝaĵojn kaj prezentas diversajn programerojn. Antaŭ du

jaroj ni havis sukcesan kradrostadon honore al la centa datreveno de la morto de Zamenhof. Tra la jaro mi kaj la MEA-anoj penas organizi almenaŭ kelkajn ekskursojn kaj komunajn vespermanĝojn en restoracioj.

K: Kio pri Meetup?

J: Mi registris ĉirkaŭ 1200 homojn, kiuj esprimis pere de Meetup intereson pri Esperanto, sed al la kunvenoj venas nur 5 ĝis 15 el ili.

K: Ĉu la melburnanoj uzas sian bibliotekon?

J: Malofte. Pli la komencantoj ol la progresintoj. Mi imagas propran E-domon, ne luitan ejon kiel nun, kie la libroj estas ĉiam videblaj, tuŝeblaj, prunteblaj.

K: Malgraŭ ĉio kion vi jam faras por Esperanto, vi surprizis nin ĉiujn per kreo de muzikbando EKDE TIAM kaj faris vian unuan, tre sukcesan publikan koncerton, dum la ĉi-jara somerlernejo en Adelajdo. Gratulon al vi!

J: Dankon! Mi muzikumas kun mia partnero Petro. Li ludas tamburojn, mi estras la elektraĵon ilojn, verkas la tekstojn kaj kantas.

K: Ĉu vi intencas ludi kaj esperante kaj angle?

J: Ni volas esti nur E-bando kiu, espereble, portos sian muzikon al multaj E-aranĝoj de la mondo kaj ankaŭ muzikumos al la ĝenerala komunumo en Aŭstralio.



Kiel vi fartas – 3zzz?

INTERVJUIS: KATJA STEELE (ADELAJDO)

Tiuj, kiuj aŭskultadas la Esperantlingvajn elsendojn de la Melburna radiostacio 3zzz bone konas la voĉon de Franciska Toubale. Ŝi ja eniris la elsendo-teamon jam en 1998. Proksimume de 15 jaroj ŝi estras la nun 6-personan skipon, kiu provizas al siaj aŭskultantoj novaĵojn, interesaĵojn, literaturon, muzikon kaj multon pli.

Katja: Ĉu estas vi, kiu respondecas pri ĉiu laboro?

Franciska: Feliĉe ne. Nun la membroj de la grupo estras la unuopajn elsendojn laŭvice. La aktuala respondeculo zorgas ankaŭ pri la muzikaj eroj por la koncerna programo.

K: Kiuj estas la aliaj teamanoj?

F: Krom mi estas Heather Heldzingen kaj Laszlo Farkas, Karlo Egger kaj Matt Englesos.

K: Viaj aŭskultantoj jam scias, ke vi ĉiujare forestas dum proksimume du monatoj.

F: Jes, mi vizitadas miajn familianojn (mi havas 4 infanojn kaj 8 genepojn, vojaĝas al E-aranĝoj...). Por tiu tempo mi antaŭregistras elsendaĵojn, kutime verkon de

aŭstralia esperantisto. Por ĉi tiu jaro mi planas prezenti materialojn, kiujn preparas Charles Stevenson pri la esperantistoj de Aŭstralio.

K: Kiom da reagoj al la unuopaj elsendoj vi ricevadas?

F: Ne multajn. Oni levas sian voĉon plej rapide, kiam estas iu teknika problemo. Sed ni ja ricevas reeĥon el ĉiuj kontinentoj kutime dum la internaciaj E-aranĝoj. Regule okazadas, ke al mi nekonataj partoprenantoj de iu aranĝo alparolas min kun "Mi aŭskultas viajn elsendojn", "Mi aŭdis vin" k.s. La japanaj samideanoj de Jokohamo ĉiam reagas, kiam ni legas el ilia bulteno "Novaĵoj tamtamas".

K: Ĉu vi havas eksterajn kontribuantojn?

F: Ne ofte. Normale estas mi, kiu iras al eblaj intervjuotoj de aŭstralio kaj eksterlando.

K: Kiamaniere vi arĥivas la registraĵojn?

F: En la 1990-aj jaroj Svetislav Kanaĉki (la iniciatinto de la E-grupo de la radio) uzis sonbendojn. Estas granda demando, kiel kaj kie arĥivi ilin. La postaj elsendoj estis sur disketoj. Ekde 2004 ni metas la registraĵojn de la unuopaj elsendoj en la retejon de la Melburna Esperanto-Asocio. Tiujn vi povas aŭskulti kiam ajn.

K: Ĉu la necesa financa bazo ĉiam haveblas?

F: Ni bezonas konstante iom pli ol 40 membrojn kaj kadre de la radiotono en oktobro de ĉiu jaro ni devas arigi mil dolarojn. Dum ni havas grandanimajn subtenantojn kiel ekzemple Dorothy Enderby, ni sufiĉe rapide kolektas la necesan monsumon.

K: Kiaj estas viaj esperoj por la estonto?

F: Ke venos pli da kontribuantoj (simpla afero, se vi uzas la reton) kaj talentaj junuloj, kiuj transprenos de ni la laboron. Ni havas nun unu eblan kandidaton por tio, sed se iu(j) el la legantoj de tiu ĉi intervjuo ŝatus aldoniĝi al nia kreema grupo, ni tre volonte enkondukos lin-ŝin-ilin en la ecojn de nia radia metio.

Fotoj de la kongreso en Adelajdo

DIVERSAJ FOTISTOJ









Kombuĉo

El prelego ĉe la velingtona kongreso, NZ en januaro.

‘*Kia-ora*’ kaj bonan tagon. Mia nomo estas Paŭlo, mia monto estas la Waitakere-a Montoĉeno, kaj mia rivero estas la Whau. Mia familio estas el Skotlando kaj Anglujo, kaj mi plenkreskiĝis kiel Aŭklandano.

Mi kaj mia edzino, Karen, gustumis kombuĉon unuafoje pro briĝa klubanino, ĉe pasintjara kristnaska festo. Post tiam, januare, alia klubanino donis al ni skobion, vitran ujon, skribitan recepton, parolitan lecionon kaj naztukon de sia edzo. Ankaŭ mia filino Charlotte kelkfoje trinkas kombuĉon, kaj ŝia plej ŝatata gusto estas la kivifrukta.

Pri Kombuĉo

Kombuĉo estas unu el la multaj tipoj de fermentintaj trinkaĵoj en la mondo. Aliaj ekzemploj estas vino, viskio, vodko, rumo, biero, ktp. Oni diras, ke ĝi historie venis el aŭ Koreio aŭ Ĉinio aŭ alia kulturo ĉirkaŭ tiuj regionoj antaŭ kelkcent jaroj. Laŭdire, pro la konsistaĵo de skobio, kombuĉo estas bona por la digesta sistemo. Oni povas gustigi ĝin per diversaj aferoj. Ekzemplaj gustoj estas citrona kun zingibro, vinbera, kivifrukta, mirtela, ananas-gujava, rubusbera, poma, miela, oranĝa kaj multaj aliaj dolĉaj gustoj. Tamen, antaŭ ol oni provas gustigi kombuĉon, oni ne scias kiom bona aŭ malbona la gusto estos. Oni povas ankaŭ uzi ne tiel bonajn gustigojn: ekzemple konservita citrono, glacia ĉerizo, kaj mandarino (kiu estas frukto, ne lingvo – la lingva nomo estas

**PAUL GARWOOD
(NOV-ZELANDO)**

mandareno). Iaj gustumindas kelkfoje, ekzemple oranĝsuka, citrona, kaj citrona kun kapsiko. Ĉijare, mia familio faras kombuĉon. De la komenco ĝis la fino, la tuta procezo estas inter du kaj kvar semajnoj. Se oni aĉetas kombuĉon, ĝi tial multekostas.



La kvar plej ofte uzataj iloj – dekstrume de supre-maldekstre: funelo, mezura kulero (por gustumi), kribrilo, kulerego.

Bezonataj iloj kaj ingrediencoj:

Skobio – vivanta mikroorganisma aro da bakterioj kaj feĉo (en la angla, SCOBY)

Vitra ujo – kiu povas porti proksimume ses litrojn da likvaĵo, kovrilo nenecesa

Rustorezista ŝtala aŭ vitra bovlo – por enmeti la skobion mallongatempe

Argila ujo kun kovrilo – kiu povas porti proksimume du litrojn da likvaĵo – por la teo

Teaj saketoj – normalaj aŭ gustigitaj (sed plejbone ne verdaj)

Sukero – por la feĉo

Diversaj fruktoj – por la gusto



La Unua Fermentado

En dulitra poto, faru varman teon, uzante ok teajn saketojn kaj unu kaj trionon da tasoj da sukero. Ne zorgu pri via dieto, ĉar la sukero estas por la skobion, ne por vi.

Lasu ĝin nature malvarmiĝi al ĉambra temperaturo, inter proksimume ses kaj ok horoj aŭ dumnokte. Kiam ĝi malvarmiĝis, verŝu la teon en la vitran ujon, kaj plenigu ĝin per akvo. Kovru la supron de la vitra ujo (kiu jam enhavu la skobion) per pura teksaĵo, ekzemple muslino aŭ neuzita naztuko. Skribu ie aŭ enmemorigu la daton.

Dependas de la vetero, sed post du aŭ tri semajnoj (somere estas unu aŭ du semajnoj, vintre estas proksimume tri semajnoj), gustumu la teon. Se ĝi jam gustas tee, ĝi pli da tempo bezonas. Se ĝi gustas vinagre, vi nun havas unufojan fermentintan teon, do ek al la sekva paŝo.

La Dua Fermentado

Sensape, kun la plej varmega akvo eltenebla al vi mem, lavu viajn manojn. Mane, prenu la skobion el la unufoje fermentinta teo, kaj metu ĝin en alian rustorezistan ŝtalan aŭ vitran bovlon.

Ne uzu sapon aŭ plastajn ujojn, ĉar ili povas malsanigi la skobion. Kovru



Kvin gustoj de maldekstre al dekstre: vinbera, mirtela, rabarba, rubusbera, ananas-gujava (angle "feijoa") – nur fruktoj.

la skobion per iom da la teo el la plej granda ujo, kaj kovru la bovlon per tuko.

En lavitajn, refermeblajn botelojn, metu iom da diversaj fruktoj, proksimume unu aŭ du centimetrojn da pecoj da fruktoj. Ĉar la vitra ujo portas ses litrojn da likvaĵo, ĝi pezas, do uzante kuleregon kaj funelon, prenverŝu la teon en ĉi tiujn botelojn.

Dum la sekvaj tri aŭ kvar tagoj, trifoje tage, aerumu la botelojn malfermante kaj refermante ilin – ĉi tiu ago nomiĝas 'ruktigado', aŭ en la angla, 'burping'. Kelkfoje, kun kelkaj fruktoj, ĉi tiu ja povas kaŭzi aŭdeblan bruon. Ekzemplo de bona refermebla botelo estas tiu de la bierkompanio 'Grolsch'. Tamen, prizorgu la larĝecon de la boteloj, ĉar vi ja devas enmeti kaj repreni la fruktojn.

Ĉi tiu paŝo povas enigi aeron en la likvaĵon, sed ne ĉiufoje. Por ni, ĉi tiu ŝajne okazas nur tiam, kiam ni uzas citronon. Ŝajnas, ke ju pli larĝa la kolo, des malpli la rukto.

Post ĉi tiuj tri aŭ kvar tagoj, uzante funelon kaj ĉifoje kribrilon, verŝu la dufoje fermentintan teon en aliajn, lavitajn, refermeblajn botelojn. Metu la restantan fruktaĵon en la kompoŝton, aŭ nutru kokinojn per ĝi.

Konservu la plenajn botelojn en



fridujo, kaj laŭvole ĝugustumu ĝin. Ĉar la trinkaĵo enhavas mikroorganismojn, via stomako eble ne alkutimiĝis al ĝi, do se vi ne jam trinkis ĝin, komencu



per malgranda kvanto. Plie, ĉar ĝi estas fermentinta trinkaĵo, ĝi enhavas iomete da alkoholo, eble ĉirkaŭ unu elcento.



Koloro post dek minutoj; koloro post kvar tagoj

Kostariko

**INDRANI BEHARRY-LALL
(ADELAJDO)**

En julio/aŭgusto mi feriis en Kostariko.

Kostariko estas jam delonge konata pro siaj agadoj: konservi la naturon; gardi la sovaĝajn animalojn; subtenadi la ekologion, recikligi elĵetaĵojn; kaj uzadi renovigeblajn fontojn/rimedojn, ktp.

Tia konservado evoluis ekde la komenco de la 20a jarcento, kiam oni eltrovis ke duono de la arbaro jam estis detruita. Nun oni ne rajtas forhaki eĉ unu arbon sen permeso.

Krome nuntempe triono de la lando estas dediĉata por naturaj parkoj, sovaĝaj



animalo-rifuĝejoj, marĉoj por la fiŝoj kaj birdoj, biologaj rezervejoj k.a.

Ĉio tia estas kontrolata de la Ministerio de la Medio kaj Energio.

Krome 90% de la landa energia konsumado venas el la vento, geotermaj fontoj kaj la suno. Jam en 2018!!... Aŭstralio celas 30% en 2030!!!

Alia interesa fakto - ekde 1949 oni forigis la armeon.

Kostariko ankaŭ promocias ekoturismon (pri-ekologia turismo) tiel ke per turismo oni provizas laboron al tiuj kiuj alie detruus la abundon de la lando por vivteni sin.

Kompreneble mi ĝuis esti en tropika lando kun varma vetero (tamen ankaŭ multe da pluvo ĉe la Kariba marbordo!). Mi ankaŭ ĝuis la fruktojn faritajn el nekredeblajn



fruktosukojn. La manĝaĵo estis tre freŝa kaj farita el plantproduktaĵo. Inter ili estas pizango, kokoso kaj kano(suko).

Ni vidis ankaŭ la fremdajn bestojn kiel bradipon, diversajn simiojn, igvanon, birdojn ktp.

La civilizita ĉefurbo San Jose havas belajn konstruaĵojn. Famaj inter ili estas la Teatro Nacia (National) finkonstruita jam en 1897, la muzeo de Oro kaj la muzeo de Jado.

Entute estis ferio kie mi lernis multon pri kiel lando povas konservi sian naturon kaj samtempe prizorgi la popolon.

Survoje ree al Aŭstralio, mi haltis en Rapa Nui (Paska Insulo)

Ĝi estas lando tre izolita kaj troviĝas 3700 km okcidente de Ĉilio en la Pacifika Oceano, kun popolo de proks. 8000.

Tie mi spertis vilaĝan atmosferon kontraste al Kostariko.

La originala popolo evidente migris el Polinezio. Tio videblis kiam mi ĉeestis kulturan vesperon kaj notis la similecon en ties dancoj kaj arto. Ankaŭ mirinde estas la klopodo por rehavigi ilian originalan lingvon.

Kompreneble mi ekskursis tra la insulo por vidi la famajn Moai-statuojn,



faritaj el tofoŝtono. Tiuj staris sur platformo nomita Ahu. La Moai troviĝas sur pli malpli la tuta marbordo, kaj ĝis nun oni ne scias kiel la popolo tiama povis movi ilin sen modernaj iloj. Estis tre interese lerni pri ĝia historio kaj ĝui la lokan manĝaĵon.

Do, entute mi agrable feriis en du tre diversaj landoj!



Roger Springer

Jam en Novembro 2018 elsendiĝis la 400a novaĵletero de Aŭstraliaj Esperantistoj, la kreaĵo de Roger Springer. AEA sendis gratulmesaĝon al li pro lia daŭra kaj bona laboro. Sube estas biografieto pri Roger.

Loĝlokoj

Mi naskiĝis en Sidnejo (Royal Northshore Hospital) en majo 1931.

Mi ankoraŭ loĝas en Sidneja antaŭurbo Mosman 1931 ĝis 1954, Birrong 1954 ĝis 1971, Manly 1971 ĝis nun. (2019)

Mi laboris por la NSKa Ŝtata Registraro kiel mapisto kaj komencis en la urbocentro de Sidnejo je 1949. Oni sendis la fakon al Bathurst 1976. Mi loĝis en Bathurst (tri horojn okcidente de Sidnejo aŭtomobile) dum la laboraj tagoj kaj Manlio dum la semajnfinoj, inter la jaroj 1976 ĝis 1986

Mia Laboro

Mapisto 1948 ĝis 1986

Parttempa instruisto pri Publika Administrado 1970 ĝis 1975

Mi gajnis la diplomon pri Tera kaj Inĝeniera Mezurado en 1954, (Land and Engineering Survey Certificate), kaj la diplomon de Publika Administrado en 1969. (Diploma of Public Administration).

Mi emertiĝis kaj plentempe loĝis en Manlio je 1986.

Emeritula laboro

Interesis min investi en domoj por la luigaj enspezoj anstataŭ emeritula pensio.

Mi kredis ke la loko de tiuj domoj tre

gravis kaj elektis la domojn tre zorge.

Dum kelkaj jaroj mi serĉis kaj aĉetis 4 taŭgajn domojn, sed nur kiam mi povos pagi elspezojn sen problemoj.

Se eble, mi mem riparis. Mi lernis multon pri kiel fari la bezonitajn riparojn. Plej ofte mi prizorgis la kontojn kaj lupagojn.

Ĉe la domo, en kiu mi elektis vivi, mi ŝanĝis kaj beligis ĝin.

En la 2018a jaro mi vendis la 3 luitajn domojn kaj donis la monon al la geinfanoj.

Sakfajfilisto

Mi soldatiĝis en la parttempa armeo en 1949. La armeo instruis min ludi la sakŝalmon. Mi estis pagita kiel soldato, ni tendumis dum almenaŭ kvar semajnfinoj kaj 14 ĝis 21 tagoj jare. Kelkfoje la muzikistaro ludis en Indonezio, Singapuro, Kanado, Novzelando kaj Gvamo. La sakŝalmo estis mia tre ŝatata ŝatokupo. Post la armeo mi ludis kiel ĉefa sakŝalmisto en la manlia grupo ĝis mia 78a jaro.

Miaj Edzinoj

De 1954:- Marjorie la unua edzino kaj patrino de miaj 4 gefiloj.

Ŝi mortis pro kancero.

De 1985:- Lesley la dua edzino laboris en Bathurst. Ŝi ankaŭ mortis pro kancero.

De 2005:- Mei la tria edzino. Ŝi estas pli juna ol mi kaj espereble mortos post mi.

Esperanto

Mi ne estas lingvisto. Mi malsukcesis studi la gramatikon, ktp en la lernejo, sed mi ĉiam kredas ke la mondo bezonas

saman duan lingvon.

Kiam en la 1960a jaro oni informis min, ke estas monda lingvo, Esperanto, mi aĉetis libron kaj studis ĝin.

Mi aniĝis al la Manlia grupo. Kelkfoje mi iris al la EFNSK, sed la sakŝalmistoj renkontiĝis je la sama nokto do mi iris tien.

Kun la helpo de la Manliaj Esperantistoj mi kreis radioprogramojn.

Mi uzis ilin en Bathurst kaj Manlio inter 1980 ĝis 1987.

Kiel Esperantisto mi iris al Ĉinujo 1978 kaj restis unu jaron. 2004-2005.

Ankaŭ mi iris al Italio en 2006.

Aŭstraliaj Esperantistoj (novaĵletero)

La 2011a jaro ne estis bona por la AEA kaj Esperanto en Aŭstralio.

La malkontenteco kreskis ĝis multaj Esperantistoj planis krei alternativan landan asocion. Mi kredis ke la problemoj ekzistis pro la manko de informo inter la Esperantistoj en Aŭstralio.

Mi kreis la 'Aŭstraliaj Esperantistoj' ĉiusemajnan ĵurnalon por nuligi tiun mankon. Mi elsendas ĝin ĉiusemajne.

La celo de la novaĵletero estis krei Esperanto-familion kaj ke novaĵoj pri la anoj kaj grupoj kunligus tiun familion. Tre rapide mi eksciis, ke la plej multaj Esperantistoj ne sendus la bezonatan informon al AE. Marcel sendis gramatikajn artikolojn kaj mi uzis tiujn kaj pli longajn artikolojn. AE flankendirektiĝis iomete.

Eksterlandaj Esperantistoj petis ke mi sendu ekzemplerojn de AE al ili. Mi fieris kaj metis ilin en la liston de ricevantoj.

Esperanto-Federacio de NSK

Mi aniĝis al ĝi ĉirkaŭ 1960. La

konflikto inter la sakŝalma ludado kaj Esperanto rezultis, ke mi malofte ĉeestis la Esperanto-kunvenojn.

Post ŝanĝoj de miaj cirkonstancoj mi estis elektita al la Estraro de EFNSK.

Poste mi estis elektita Prezidanto. Kiel emerita homo, mi povis labori plentempe je la aferoj de la EFNSK. Mi prezidantis dum 8 jarojn.

Por ke mi ne altrudu al la nova Estraro, mi ĉesis iri al EFNSK.

The Key to Languages

Dum du jaroj mi laboris pri la libreto Key. Mi serĉis la informon, Margaret Chaldecott tajpis ĝin kaj la tajpita informo estis en la komputilo. Per la komputilo mi povis aranĝi la informon en taŭgan formon.

La unua celo estas ke ĝi povu esti presita sur du pecoj da A4 papero. La dua celo estis havi bonan propagandilon por lingvistoj, studentoj kaj aliuloj. Mi petis helpon en la novaĵletero kaj la sola respondanto estis Vera Payne. Ŝi provlegis kaj donis kelkajn sugestojn.


La libreto estas taŭga propagandilo. La problemo estas kiel disdoni ĝin. Mi metas skatolojn sur la stratpordo ĉe Esperanto Domo kie miloj da studentoj preterpasas tage. Mi metas skatolojn sur la antaŭa barilo ĉe mia domo kaj metas ekzemplerojn en la atendejoj ĉe mia hartondisto kaj kuracisto. Mi disdonas 1000 kopioj jare.

Mi revas ke la Esperantistoj en Aŭstralio farus simile, sed versajne ne. Ankaŭ estas profesiaj distribuistoj, sed ili bezonas pagon kaj la Esperantistaro ne interkonsentis.

La fordonitaj libretoj estas en domoj kaj kiu scias kio okazos estonte?

Benzinmanka lando

**DAVID RYAN
(WELLINGTON)**



Senbenzina benzinvendejo

Mi timas ke mi neniam revidos mian karan Nov-Zelandon! Ĉi-momente en frua januaro 2019 mi ferias kun mia familio en Meksikio kaj en la venonta semajno ni devos veturi 70 kilometrojn en aŭtomobilo aŭ aŭtobuso al la internacia flughaveno por nia flugo hejmen. Tamen, kiel ni atingos la flughavenon ĉar en Meksikio nun mankas benzino!

Novelektita Prezidanto enposteniĝis en decembro 2018. Li trovis ke dum multaj jaroj krimuloj ŝtelis benzinon el la duktoj de la ŝtata benzina kompanio, Pemex. Tial, li decidis fermi la duktojn kaj nun Pemex devas liveri benzinon trajne aŭ per cisternokamionoj. Tiu ne estas tre efika sistemo en granda lando.

Pro tio, mankas benzino en multaj regionoj de Meksikio. Multaj benzinvendejoj estas fermitaj kaj, kiam oni informiĝas ke cisternokamiono baldaŭ alvenos, grandaj vicoj subite formiĝas en la strato antaŭ benzinvendejo. Por plimalfaciligi la aferon, multaj homoj alportas plastajn ujojn kiujn ili plenigas por poste vendi benzinon en la nigra merkato.

Pro la krizo, ŝajnas, ke kelkaj lernejoj kaj laborejoj nun devos fermiĝi ĉar lernejoj kaj laboristoj ne povas ĉeesti. Tiu povas esti grava problemo por la meksikia ekonomio.

Feliĉe, ne mankas benzino por aviadiloj, sed ĉu ni aŭ eĉ nia piloto atingos la flughavenon?

Esperanto: Universala help-lingvo

PAUL DESAILLY (ADELAJDO)

La sekva estas traduko de prelego/ diskutigo gvidate de Paul Desailly ĉe la "Skatolfabrikejo" en Adelajdo en 2018. La celata aŭskultantaro estas angla parolanta, do la originala estis en la angla. Ni prezentas ĝin ĉi tie kiel ekzemplo por kiel diskutigi grupon kaj prezenti faktojn pri Esperanto. Estas dua parto pri Esperanto en Azio, kiun ni prezentos en posta eldono. RED.

ANTAŬPAROLO

(i) Se tempo estas je la dispono de la grupanoj esploru la pseŭdonimon de D-ro Zamenhof (D-ro Esperanto), la efikojn de carisma medio, de modernaj teknologioj kaj de radikalaj teorioj, la lingvon de lia konkuranto (Monsignore Schleyer) kaj la influon de liaj gepatroj (Markus kaj Rozalia) de lia edzino (Klara) kaj de ilia plej juna filino (Lidia). Hejmtasko: preparu tri-minutajn prezentojn.

(ii) Eble vi, kiel la instruisto aŭ kunordiganto, devus laŭtlegi la unuan paragrafon kaj sekve libera interŝanĝo de opinioj fluos. Klarigu la vastan diversecon de la Esperanto-movado kaj la rigoran neŭtralecon de la Universala Esperanto-Asocio, precipe pri politiko kaj religio.

(iii) Invitu lernantojn laŭvice unu post la alia laŭtlegi paragrafon al la grupo kaj komenti aŭ silenti se ili deziras. Laŭtlegado estas laŭvola elekto por vi kaj por lernantoj ĝis lingvaj kaj sci- niveloj estas evidentaj, aparte en grupoj de nacilingva avantaĝo al iuj ĉeestantoj.



JEN NIA TEMO KAJ ELIRPUNKTO

Parto uno

D-ro Zamenhof kredas, ke universala helpilo realigos la mondan pacon.

Kiel? Ĉu vi estas serioza aŭ iluzia doktoro?

Antaŭ ĉio, bonvolu malkonsenti kun mi dum tiu ĉi interaktiva prezento por ke ni havu dialogon, ne sensukan unudirektan paroladon. El la kolizio de malsamaj opinioj brila sparko de la vero elŝutas, kondiĉe ke ni ne forgesu, ke kiam du amikoj riproĉe argumentas inter si pri filozofia punkto, ambaŭ el ili definitive malĝustas.

(1a) Venis kio en vian menson en tiu tago kiam vi unue aŭdis la vorton "Esperanto" aŭ pri la esperantistoj? Ĉu temas pri itala opero ie en Utopio?

Tiuj ekzotikaj esperantistoj transirantaj de malĝojuloj al frenezuloj! Neebla! Ne malŝparu nian tempon aŭ vian! Kio estas via reala opinio?

(1b) Kio do ekzemple estas unu mondlingvo? Ĉu ĝi estas ebla, dezirinda, praktika?

(1c) Kiom da internaciaj lingvoj nun ekzistas aŭ iam ekzistis? Kiom da artefaritaj lingvoj?

(1d) Kio estas universala helpa lingvo? Kia estus ĝia utiligado tra la mondo - ekonomie, socie, kulture...? Ĉu la tuta nocio estas absurda, danĝere malutopia ...?

(1e) Kio estas *La Danĝera Lingvo*? Kiu nomis ĝin danĝera kaj kial? Kio igas lingvon en si mem danĝera?

<http://www.linguistic-rights.org/21-02-2017/en.html>

https://en.wikipedia.org/wiki/1971_Dhaka_University_massacre

https://en.wikipedia.org/wiki/Language_Movement

(1f) La Interna Ideo de Esperanto signifas por multaj samideanoj ĝian esencon. Naŭ ŝlosilaj paragrafoj en la parolado de D-ro Zamenhof de 1906 en Genevo evidentigas lian pozicion pri Esperantismo. (Vidu: http://bahai.uga.edu/Realigas_la_Mondan_Pacon.pdf p. 24-26 *)

Ni nun laŭtlege aŭ enhejme ekzameni lian eseon. Se vi preferas ne laŭtlege ĉe tiu ĉi kunveno, tio estas tute en ordo. Tiu paĝaro inkluzivas Esperanto-kurson, gramatikon kaj vortareton. * Mia libro estas senpage havebla en Esperanto danke al la Universitato de Georgio, Usono. Recenzoj, komentoj kaj helpoj de Osmo Buller, Renato Corsetti, Kep Enderby, Ralph Harry, Marcel Leereveld, Mao Zifu, Vera Payne, Trevor Steele, k.a.

<http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=6655>

(2a) Esperantismo estas porpaca mond-movado kies oficiala pozicio estas (a) tute nepartia pri politiko kaj (b) absolute neŭtrala pri religio. Ke Hitlero kaj Stalino kaj similaj monstroj la Movadon malpermesis (multajn membrojn la sovet-tirano eĉ maljuste ekzekutis) indikas, ke la Esperanto-movado ĉe internacia nivelo estas foje devigata tre kritiki iujn estrojn. <http://blogs.bl.uk/european/2017/08/triumph-and-tragedy-esperanto-and-the-russian-revolution.html>

(2b) Multaj religiaj organizoj kaj Neregistaraj Organizaĵoj sendas reprezentantojn kaj observantojn al grandaj Esperanto-eventoj kiel la jara Universala Kongreso de Esperanto: 97-a Hanojo 2012, 98-a Reykjavik 2013, 99-a Bonaero 2014, 100-a Lille 2015, 101-a Nitra 2016, 102-a Seŭlo 2017, 103-a Lisbono aŭgusto 2018, kaj ankaŭ al la trijara Azia Kongreso de Esperanto: Bengaluro 2008, Ulan Bator 2010, Jerusalemo 2013, Quanzhou 2016. Observi kaj kompreni en unu halego miloj da esperantistoj el sepdeko da landoj kaj de ĉiuj profesioj kies konversacioj pri tre diversaj temoj okazas inter lingvo-egaluloj estas metafore vidi la falon de Babel-turo. (*Genezo* 11: 1-9. Tradukis: L. L. Zamenhof.)

(3a) El la 100.000 aktivaj aŭ modere aktivaj esperantistoj tra la mondo, eble unu el dek estas tute flua. Tamen, multaj pliaj samideanoj enkapigas bazajn salutvortojn kaj esprimojn de la internacia lingvo. Tiu granda plimulto aktivas en la Movado sen aliĝi al iu ajn aparta grupo - politika, religia aŭ alia. El tiuj, kiuj organiziĝas en grupoj kaj de la monda sidejo de Esperanto (Roterdamo)

estas administrataj, almenaŭ parte, la plej grandaj grupoj troviĝas inter Blinduloj - 500, RomKatolikismo - 1.300, Kristana Evangelismo - 350, Komerc-ekonomia fakgrupo - 100, Etna Liberigo - 150, Ekologiismo - 300, Samseksama esperantistaro - 200, Ĵurnalismo - 150, Medicino - 500 kaj Amikaro Bruno Groning - 300, Naturismo - 100, Filatelio - 100, Handikapuloj - 200, Oomoto (japana religio de Ŝinto-deveneco fondita en 1892) - 700, Radio-amatoroj - 300, Rotario - 100, Skoltado - 50, Spiritismo (F V Lorenz, Brazilo) - 600, Instruistoj - 700. Eble 1.000 Esperantistoj subtenas nenacian, edukan, socialisman grupon en Parizo bazita, nome, Sennacia Asocio Tutmonda (SAT). Bahaismo listigas 200 membrojn. Du Budhismaj (Budhana Ligo Esperantista kaj Ŭonbulismo), unu islama kaj diversaj kristanaj grupoj (Adventistoj, Atestantoj de Jehovo, Kvakeroj, Mormonoj, Ortodoksanoj, Unitarianoj kaj aliaj) ankaŭ ĝuas reprezentadon, samkiel la Kosmologio de Martinus, Hilelismo kaj Homaranismo. Ateistoj ankaŭ organizas sin en grupon kies nombro tamen ne estas anoncita en la *Jarlibro*. **Religiuloj kaj adeptoj de diversaj Filozofioj do konsistigas proksimume 50% de la grupigitaj aŭ fakaj organizoj de la Universala Esperanto-Asocio.** Tamen, negrupemuloj kaj nefakaj delegitoj de Universala Esperanto-Asocio formas plimulton de la tutmonda esperantistaro.

(3b) La monda centro de Universala Esperanto-Asocio (UEA) en Nederlando estas demokratia institucio kies profesia teamo kunordigas internaciajn Esperanto-kongresojn kaj propagandadon, turismon, bankadon kaj dungadon. UEA multmaniere helpas verkistojn kaj edukistojn pri

eldonado kaj pedagogio kaj inter aliaj servoj kunligas du milionan Esperanto-diasporon kun sia teamo de 2.000 delegitoj, 5.000 abonintoj kaj multnombraj parolantoj kaj lojalaj subtenantoj en 120 naciaj organizoj sub sia efika kaj servema ombrelo.

www.uea.org

(3c) En 1954 UEA aliĝis al Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo. En 1966 UEA prezentis al UN kaj UNESKO unu el la plej grandaj petskriboj en la historio de Unuiĝinta Naciaro. Unu miliono da unuopuloj el 74 landoj persone ĝin subskribis, inkluzive de estroj de registaroj, gvidantoj de sindikatoj, karitataj organizoj, kluboj, ktp. Ili unuanime rekomendis iom-post-ioman enkondukon de Esperanto en ĉiujn lernejojn tra la mondo. Entute, do, sepdek unu milionoj da homoj apogis Esperanton kaj ĝiajn mond-pacajn iniciatojn. (Vd: *Aventuroj en Esperantujo*, p. 66, Ambasadoro Ralph Harry) Koncerne rezoluciojn de UNESKO adoptitajn en 1954 kaj 1985 kaj ankaŭ de Ligo de Nacioj (LN) en 1922, morala subteno en UN-rondoj estas memevidenta. Por legi raporton pri makiavelaj maĥinacioj en Genevo, la urbo de la nacioj, kiuj tre malhelpis Esperanton tuj post la unua mondmilito vidu jenan retpaĝaron. (* p41) Esperanto-oficejo estas administrata en Novjorko ĉe UN. La kulturaj aferoj de UN plejparte estas de UNESKO organizataj, kiu siavice daŭrigas "prizorgi la progreson de Esperanto".

http://en.wikipedia.org/wiki/World_Esperanto_Association#International_organizations

Australian Esperanto Association

Esperanto House
143 Lawson Street
Redfern NSW 2016
Australia

www.esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
+61 (07) 4696 9293

Sandor Horvath | **President**
Jonathan Cooper | **Vice-President**
Heather Heldzingen | **Treasurer**
Esther Parris | **Secretary**

Committee Members:

Terry Manley, Indrani Beharry-Lall

AEA was established for the promotion, education and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.



Bradley McDonald | **President**
Ivan Pivac | **Vice-President**
David Ryan | **Secretary/Treasurer**
Dave Dewar | **Assistant Secretary**

Committee Members:

Erin McGifford, Chris Krageloh

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.

New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
nzea@esperanto.org.nz
0800 350 781



Partoprenantoj de la nacia kongreso de Esperanto kaj somerkursaro en Adelajdo, januaro 2019

Malantaŭa vico: Michael CARNEY, Katja STEELE, Franciska TOUBALE, Cathy TAGGERT, Steve PITNEY, Vere WILLIAMS, Charles STEVENSON, Paul DESAILLY, Szabolcs SZILVA, Rikardo NEWSUM, Amato KIM, Max WEARING, Leigh DICK-READ, Eddie DESAILLY, Eileen JONES, Mary MILLS, Trevor STEELE, Min LIN **Meza vico:** Ivan SERVE, Indrani BEHARRY-LALL, Sandor HORVATH, Heather HELDZINGEN, Esther PARRIS, Asnika EHLERS, Dan EHLERS **Antaŭa vico:** Benno LANG, Sarah PALMER, Joanne JOHNS, Ran LUY, Helen PALMER, Amo DESAILLY, Leif EHLERS **Ne fotitaj:** Jonathan COOPER, Peter JOHNS, Hazel GREEN, Paul GREEN, Finnur LARUSSON, Kam LEE, Bradley McDONALD, Gary SMITH, Marumi SMITH